

Kostenloser Esperanto-Kurs – 5. Lektion

1. ĈU ANKAŬ VI?

Poprad, la 18-an de majo

Kara Peter!

Multajn salutojn el Slovakujo sendas al vi Klara. La tagoj ĉi tie pasas tre rapide. Tial nur hodiaŭ mi sukcesas skribi al vi. Mi esperas, ke mia bildkarto atingos vin antaŭ la fino de la kurso. Ĉi tie ĉio plaĉas al mi. Ankaŭ la amasloĝejo, en kiu loĝas mi kun dudek junuloj: Apud mi dormas Maria el Polujo kaj Aurelie el Francujo. Aurelie estas la plej aĝa el ni, 27 jarojn ŝi aĝas. La knabinoj estas tre gajaj. Ankaŭ la vetero bonegas. La suno brilas, la ĉielo estas blua, sed vespere estas malvarma aero. De mateno ĝis vespero ni konversacias en Esperanto. Ĉar mi estas la sola germanino ĉi tie, mi ne povas paroli germane. Proksime al la kursejo troviĝas naĝejo kaj mi hieraŭ enakviĝis (en-akv-iĝ-is). Ĉirkaŭ la kursejo estas granda ĝardeno. Antaŭhieraŭ nia grupo lernis dum la tuta tago ekstere, en tiu ĉi ĝardeno. Apud la ĝardeno troviĝas la tendejo. Cetere, estas en nia grupo du polinoj, unu francino, tio estas Aurelie, du italoj, tri rusoj, unu bulgaro, unu aŭstro, du rumanoj kaj kvar slovakoj. Do, kun mi entute (en-tut-e) dek sep personoj. En la alia grupo estas svisoj, hispano, svedo, finno kaj usonanino. Unu el la rusoj enamiĝis en la usonaninon. Nun ili ĉiam kune sidas kaj flirtas unu kun la alia. Miaj gepatroj sendis al mi jam retroŝton. Ili skribis, ke ili jam atendegas mian revenon (re-ven-on). Ĉu ankaŭ vi?

Kore salutas vin

Klara

2. NEUE WÖRTER

Zum Selberherausfinden: Slovakujo, Italujo, bulgaro, teksto.

aero	Luft	lago	See
aĝo	Alter	mateno	Morgen
akvo	Wasser	miri	sich wundern, staunen
aŭstro	Österreicher	multa	viel
brili	scheinen, glänzen	parolado	Rede
ĉiam	immer	pasi	vorbeigehen
ĉirkaŭ	um ... herum	Polujo	Polen
eĉ	sogar	polo	Pole (Einwohner Polens)
ekscii (ek-sci-i)	erfahren	por ke	so dass, damit
enamiĝi en	sich verlieben in	proksime al	in der Nähe von
entute	insgesamt	rapide	schnell
esperi	hoffen	rumano	Rumäne
fermi	schließen	ruso	Russe
finno	Finne	scii	wissen
flirti	flirten	sidadi (sid-ad-i)	lange sitzen, herumsitzen
Francujo	Frankreich	sukcesi	(es) schaffen, Erfolg haben, gelingen
franco	Franzose	sukceso	Erfolg
ĝardeno	Garten	suno	Sonne
gepatroj	Eltern	svedo	Schwede
germano	Deutscher	sviso	Schweizer
hispano	Spanier	tendejo	Zeltplatz
instrui	lehren, unterrichten	tial	darum
itala	italienisch	unu el	einer von
italo	Italiener	unu kun la alia	miteinander
klaso	Klasse	usonano	US-Amerikaner
kompreni	verstehen	Usono	USA
konversacii	sich unterhalten	vespere	abends, am Abend
kore	herzlich	vetero	Wetter
koro	Herz		

Redewendungen:

la plej aĝa	der/die älteste	iomete	ein wenig
la suno brilas	die Sonne scheint	kore salutas	(es) grüßt herzlich
de mateno ĝis verspero	von morgens bis abends	multajn salutojn	viele Grüße

3. GRAMMATIK

3.1 unu/alia

unu kun la alia	miteinander
unu la alian	einander, einer den anderen
unu al la alia	einander, einer dem anderen
unu de la alia	voneinander
unu por la alia	füreinander
unu post la alia	nacheinander
unu sub la alia	untereinander

USW.

3.2 Die bezüglichlichen Fürwörter (Relativpronomen)

Die bezüglichlichen Fürwörter (Relativpronomen) können wie im Deutschen mit Präpositionen zusammengesetzt werden, und bilden so eine Umstandsbestimmung im Teilsatz:

kiu	der, welcher
kun kiu	mit dem (gemeinsam), mit der
kun kiuj	mit denen (gemeinsam)
per kiu	mit dessen/deren Hilfe, mit dem/der
pri kiu	über den/die/das
el kiu	aus dem/der
en kiu	in dem/der

USW.

kio	was
pri kio	worüber
de kio	wovon

3.3 Reihenfolge der Satzglieder

In der 1. Lektion haben wir dir die gebräuchlichste Reihenfolge der Satzglieder erläutert. Dennoch kann diese Reihenfolge geändert werden, z.B. aus stilistischen Gründen:

La nomon de la franca knabino	oni	elparolas	Orelij.
direktes Objekt	Subjekt	Prädikat	Ergänzung

Hier ist das direkte Objekt an den Satzanfang gestellt worden. Das ist leicht an der Endung -n zu erkennen.

Ähnlich verhält es sich mit den Relativpronomen. Wenn sie das direkte Objekt des zweiten (abhängigen) Teilsatzes darstellen, erhalten auch sie die Akkusativendung:

Kie estas la libro, kiun mi vidis hieraŭ? (Wo ist das Buch, das ich gestern gesehen habe?)

Im Plural: Kie estas la libroj, kiujn mi vidis hieraŭ?

Da das Verb „vidi“ wie auch das deutsche „sehen“ ein Akkusativobjekt verlangt, spielt das Relativpronomen „kiu“ diese Rolle, da es für das Wort „libro“ aus dem ersten Teilsatz steht.

Ein anderes Beispiel:

Pardonu al mi **tion**, **kion** mi faris.

Oder kürzer: Pardonu al mi, **kion** mi faris. - Verzeih mir (das), was ich getan habe.

3.4 Ländernamen im Esperanto

Ländernamen im Esperanto werden nach zwei Regeln gebildet.

Ableitung des Ländernamens vom Bewohner mit der Nachsilbe -uj-

Germano loĝas en Germanujo,

Franco loĝas en Francujo,

Slovako loĝas en Slovakujo;

usw. für Svedo, Norvego, Dano, Anglo, Skoto, Sviso, Hispano, Italo, Greko,

Polo, Ĉeĥo, Hungaro, Ruso, ktp.

Ableitung der Bewohnerbezeichnung aus dem Ländernamen mit der Nachsilbe -an-

En Nederlando loĝas la Nederlandanoj.

En Irlando loĝas la Irlandanoj.

En Kanado loĝas la Kanadanoj,

en Usono la Usonanoj,

en Brazilo la Brazilanoj,

en Indonezio la Indonezianoj,

en Luksemburgio la Luksemburgianoj. (La anoj de la urbo Luksemburgo estas la Luksemburganoj)

Leider musst du lernen, welche Regel zu welchem Land/Bewohner gehört.

Neben diesen beiden Grundformen haben sich im Laufe der Zeit weitere Bildungsformen etabliert – Esperantosprechern ist ihre Sprache manchmal irgendwie zu einfach. Zu diesen Bildungsformen gehören *-i-* und *-land-* statt *-uj-*.

Danujo → *Danlando* / *Danio*

Wir empfehlen dir – in [Übereinstimmung](#) mit der Esperanto-Sprachnormungsinstanz „Akademio de Esperanto“ – die Wortbildung mit *-uj-* nach dem klassischen Prinzip.

Eine lehrreiche Vorlesung auf Esperanto von Akademiemitglied Anna Löwenstein gibt es auf Esperanto [im Netz](#) – wenn du weißt, was hier steht, reicht es aber auch.

Über die historische [Entstehung der Ländernamen auf Esperanto](#) und alles drum herum weiß auch die Esperantosprachige Wikipedia viel zu berichten.

3.5 Zur Wortbildung

Präfix:

- ge-: fasst Vertreter beiderlei Geschlechts zusammen
 - patro (Vater) – **gepatroj** (Eltern)
 - frato (Bruder) - **gefratoj** (Geschwister)
 - sinjoro (Herr) - **gesinjoroj!** (Meine) Damen und Herren!

Suffixe:

- -uj-: zur Bildung vieler Ländernamen, außerdem auch für Gefäße
 - franco (Franzose) - Franc**ujo** (Frankreich)
 - germano (Deutscher) - German**ujo** (Deutschland).
- -uj-: hat auch eine zweite Bedeutung: Gefäß, Behältnis
 - pano (Brot) - pan**ujo** (Brotbüchse)
 - floro (Blume) - flor**ujo** (Blumentopf)
 - mono (Geld) - mon**ujo** (Geldbeutel, Portemonnaie)
- -uj- hat auch eine selten gebrauchte dritte Bedeutung: Gewächs
 - pomo (Apfel) - pom**ujo** (Apfelbaum)
 - rozo (Rose) - roz**ujo** (Rosenstock)
 - Anstelle der Nachsilbe -uj- kann man für mehr Klarheit hier auch andere beschreibende Wörter zusammengesetzt benutzen: pomarbo und rozplanto
- -an- (Teilnehmer, Angehöriger):
 - Usono (USA) - Uson**ano** (Einwohner der USA)
 - la sama lando (das gleiche Land) - samland**ano** (Landsmann)
 - urbo (Stadt) - urb**ano** (Städter, Stadtmensch)
- -ad- (unterstreicht die Dauer einer Tätigkeit):
 - atend**adi** - lange warten
 - kuri (laufen) - la kur**ado** (das Laufen, der Lauf, das Hin- und Herlaufen)
- -ar- (Ansammlung gleicher Dinge, Sammelbegriff):
 - tendo (Zelt) - tend**aro** (Zeltlager)
 - infano (Kind) - infan**aro** (Kinderschar)
 - homo (Mensch) - hom**aro** (Menschheit)

4. ÜBUNGEN

4.1 Übersetze!

1. übereinander, nebeneinander, beieinander
2. Worüber hat er gesprochen?
3. Ich weiß nicht worüber er gesprochen hat.
4. Mit welchem Stift hat sie den Brief geschrieben?
5. Das ist der Stift, mit dem sie den Brief geschrieben hat.
6. Hier ist das Buch, das ich gestern gelesen habe.
7. Weißt du, was er getan hat?
8. Sind das die Kinder, die du vorgestern getroffen hast?

4.2 Bilde neue Wörter!

Bilde mit Hilfe der Wortbildungssilben, die du bisher gelernt hast, aus den folgenden Wörtern neue und übersetze sie anschließend:

rumano, sviso, svedo, hispano, edzo, amiko, loĝi, ĉambro, gazeto, Berlino.

5. LA PROGRAMO DE LA RENKONTIĜO

Jen vi vidas la programon de la renkontiĝo, en kiu Klara partoprenas:

tempo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo	Lundo	Mardo
8 - 9 h	Alvenado	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo
9 - 11 h		Instruado	Instruado	Instruado	Instruado
11 - 12 h		Kafopaŭzo	Kafopaŭzo	Kafopaŭzo	Kafopaŭzo
12 - 13 h		Instruado	Instruado	Instruado	Instruado
13 - 14 h		Tagmanĝo	Tagmanĝo	Tagmanĝo	Tagmanĝo
14 - 15 h		Promeno tra Poprad	Bicikla ekskurso	Historio de Esperanto	La Esperanto-movado
15 - 16 h		Japanaj manlaboroj		Esperanta literaturo	Instruado de Salsa
16 - 17 h		Kurso de la slovaka lingvo		La vivo de Zamenhof	Improviza teatro
17 - 18 h		Lingva testo		Koktelista mini-kurso	Historio de Slovakujo
19 - 21 h		Vespermanĝo	Vespermanĝo	Vespermanĝo	Vespermanĝo
21 - 22 h	Oficiala malfermo	Popola muziko	Koncerto	Teatraĵo	Internacia vespero
22 h - ...	Interkona vespero	Diskejo	Filmo	Karaokeo	Dancado de Salsa

tempo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	
8 - 9 h	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo	
9 - 11 h	Instruado	Ekskurso al Bratislava	Instruado	Rezultoj de la ekzameno	
11 - 12 h	Kafopaŭzo		Kafopaŭzo	Kafopaŭzo	
12 - 13 h	Instruado		Fina ekzameno	Adiaŭo oficiala	
13 - 14 h	Tagmanĝo		Tagmanĝo	Tagmanĝo	
14 - 15 h	Naĝado en urba naĝejo	Koncerto	Sportaj konkursoj	Forirado	
15 - 16 h			Vespermanĝo		Vespermanĝo
16 - 17 h					
17 - 18 h	Diskuttrondo				
19 - 21 h					
21 - 22 h					
22 h - ...	Diskejo				

La lingvoinstruado komenciĝas je la naŭa horo. Tagmeze estas paŭzo de unu horo. La posttagmeza (post-tag-mez-a) programo komenciĝas je la dekkvara kaj finiĝas je la dekoka horo. Ĉiuvespere okazas kultura programo: Vi povos danci, kanti kaj tiel plu. Jaŭde estas granda, tuttaga (tut-tag-a) ekskurso al Bratislava.

Krom tio kutime dum ĉiuj renkontiĝoj ekzistas:

- **Libroservo**, kie vi povas aĉeti librojn kaj kompaktdiskojn.
- **Gufujo**, trankvila loko sen alkoholo, kie vi povas trinki teon, manĝi keksojn kaj babil.
- **Trinkejo**, kie vi povas trinki ion aŭ drinki. Klarigo pri la vortoj: „Trinki“ oni uzas transitive por trinkaĵoj kun aŭ sen alkoholo, ekz. „mi trinkas akvon“. „Drinki“ oni uzas maltransitive nur por alkoholaĵoj, ekz. „mi neniam drinkas“. En la trinkejo ofte ankaŭ estas bona muziko.
- **Ludejo**, ĉar multaj esperantistoj ŝatas tablo-ludojn.

6. NEUE WÖRTER

Die folgenden Wörter kannst du dir bestimmt selbst herleiten: oficiala, testo, paŭzo, japana, teatro, karaokeo, improviza, koncerto, sporto, kekso, alkoholo, ofte

babili	plaudern	ludi	spielen
danci	tanzen	matenmanĝo	Frühstück
diskejo	Disco	movado	Bewegung
ekskurso	Ausflug	popolo	Volk
ekzameno	Prüfung	promeni	spazieren gehen
gustumi	kosten	rezulto	Ergebnis
interkona vespero	Kennenlernabend	rondo	Runde
kie	wo	ŝati	mögen
koktelisto	Barkeeper, Barmann/-frau	tablo	Tisch
kompaktdisko	CD	tagmanĝo	Mittagessen
krom	außer	teatraĵo	Theaterstück
kutime	gewöhnlich	trankvila	ruhig
L.L. Zamenhof	Name des Esperanto- Erfinders	uzi	benutzen
labori	arbeiten	vespero	Abend
		vingustumado	Weinverkostung

Vielleicht fragst du dich, welche Musik auf den Treffen gespielt wird? Mehr dazu erfährst du im zweiten Text von Lektion 8.

Ein Treffen, das dem von Klara besuchten sehr ähnelt, ist übrigens die „Somera Esperanto-studado“ (SES), die jedes Jahr im Juli stattfindet. Mehr Infos dazu unter <http://de.lernu.net/ses/> Für viele Treffen können DEJ-Mitglieder auch Reisekostenunterstützung erhalten. Mehr dazu erfährst du auf den Internetseiten der Deutschen Esperanto-Jugend – www.esperanto.de/dej.

Lösungen zu 4.

4.1

1. unu super la alia, unu apud la alia, unu ĉe la alia
2. Pri kio li parolis?
3. Mi ne scias, pri kio li parolis.
4. Per kiu skribilo ŝi skribis la leteron?
5. Jen la skribilo, per kiu ŝi skribis la leteron.
6. Jen la libro, kiun mi legis hieraŭ.
7. Ĉu vi scias, kion li faris?
8. Ĉu tiuj estas la infanoj, kiujn vi renkontis antaŭhierau?

7. KONTROLLÜBUNGEN FÜR DEINEN MENTOR

7.1 Übersetze sinngemäß folgende zum Teil zusammengesetzte Wörter:

- | | |
|----------------|--------------------|
| 1. plimultiĝi | 13. ĉiama |
| 2. plirapidiĝi | 14. remalfermo |
| 3. vesperiĝas | 15. instruado |
| 4. mateniĝis | 16. la malkompreno |
| 5. proksimiĝi | 17. sunleviĝo |
| 6. enlaciĝi | 18. malleviĝo |
| 7. elakviĝi | 19. studado |
| 8. multegaj | 20. gratulanto |
| 9. la kialo | 21. la plimultiĝo |
| 10. pollingve | 22. restaĵo |
| 11. malpli | 23. kundancado |
| 12. sunbrilo | 24. domano |

7.2 Sage sinngemäß,

- dass du am Dienstag angekommen bist,
- dass du noch Geschwister hast, die älter sind als Du,
- dass du an diesem Kurs teilnimmst, da du endlich Esperanto nicht nur lesen und schreiben, sondern auch sprechen willst,
- dass du im letzten Monat durch Frankreich und Italien gefahren bist,
- dass du beim Kennenlernabend einen netten Polen kennen gelernt hast,
- dass dir der Ausflug ins Schwimmbad und das Konzert sehr gefallen hat,
- dass du wieder auf ein Esperanto-Treffen fahren möchtest.